

# STARTO



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

1973

8(38)

T. BALDA, ĝen. sekr. de MEM

"malamikeco de la nacioj,  
falu, falu, jam tempo estas"

Interkonsento TPK-MEM  
subskribita en Moskvo

## NIA VOJO

Ĉiu prudenta kaj reale pensanta esperantisto konscias, same kiel la aŭtoro de la supre cititaj vortoj, ke por atingi la ĝeneralan pacon, interkompreniĝon kaj praktikan kunlaboron inter la ŝtatoj kaj nacioj, ne sufiĉas nur disvastigi la Internacian Lingvon, sed, ke ĉiu bonvolema esperantisto, uzante tiun ĉi lingvan instrumenton, devas aktive labori por tiuj ĉi celoj, fariĝi arda batalanto kaj disvastiganto de la kontraŭmilitaj kaj porpacaj ideoj.

Do ne sole la lingvo mem, la belaj vortoj kaj sopiroj, starigos la pacon, forigos la kialojn de la malharmonio en la mondo, sed konkreta kaj celkonscia partopreno en la vicoj de la progresemaj fortoj povas reale kontribui al tiu ĉi grandioza lukto por la tuthomraj celoj.

Esperigajn rezultojn tiuflanke alportis en la pasintaj monatoj la serioza klopodado de la ŝtatestoj, strebantaj realisme solvi la interŝtatajn problemojn. Ilin traktis kun bona rezulto ankaŭ la konferencoj en Perizo, Helsinki, Vieno kaj Genevo.

Tute senhezite oni povas deklari, ke gravan rolon en tiu ĉi epokofara procedo ludas hodiaŭ ankaŭ la potencaj kaj ĉiam pli kaj pli fortigantaj internacia kaj landaj pacmovadoj, kiuj, kune kun la ceteraj progresemaj kaj pacemaj fortoj decidoplene influas kaj apogas la traktadojn supre menciitajn.

Plezuriga por ni estas la fakto, ke en tiu ĉi pacfronto multnombre partoprenas ankaŭ pluraj esperantistoj kaj esperanto-organizaĵoj per siaj specifaj

agadformoj, talente aplikante la Internacian lingvon. Tamen ilia nombro ankoraŭ ne konformas al la nuntempa amaseco de la tutmonda Esperanto-movado. Tio venigas nin al la demando, ĉu fakte ĉiu vera kaj sindona esperantisto estas pacdefendanto.

La Mondpaca Esperantista Movado, en kies sino unuigas la plej progresemaj kaj agemaj esperantistoj-pacadeptoj, festas ĉi jare la 20an datrevenon de sia fondigo. Ĝiaj VI-a Ĝenerala Konferenco kaj Publika kunveno, okazintaj en la kadro de la 58-a UK en Beogrado, konstatis konsiderindan kreskon de la esperantista pacmovado kaj la rezultojn atingitajn dum tiuj du jardekoj. MEM gajnis inter la tutmonda esperantistaro kaj ankaŭ en la okuloj de la cetera publiko popularecon kaj renomon.

Oni povas esperi, ke dum la nova laborperiodo de MEM novaj kaj novaj adeptoj el la vicoj de la esperantistoj, kiuj ĝis nun nur pasive manifestis sian pacamon, aktivigos kaj pli energie subtenados la aktivadon de MEM. Tiamaniere plialtigos la prestiĝo de la Esperanto-movado en la okuloj de la tutmonda publiko.

Certgrade tio jam realiĝis; atestas pri tio i.a. la fakto, ke MEM estas hodiaŭ taksata kiel grava internacia institucio, pri kiu oni devas kalkuli: ĝi estas regule invitata kiel kunorganizanto aŭ partoprenanto en tutmondaj eventoj. MEM jam de post kelkaj jaroj estas en konsulta kaj praktika kontakto kun Tutmonda Packonsil-

antaro (TPK), kun Internacia Komitato kontraŭ la A- kaj H- bomboj k.a.; ĝiaj landaj sekcioj kaj perantoj aktive kunlaboras kun la respektivaj landaj pacmovadoj kaj aliaj sociaj organizaĵoj, kie la esperantistoj povas abunde realigi la taskojn adekvatajn al la Esperanto-movado. Tial M E M estis ankaŭ invitita kaj pere de siaj reprezentantoj partoprenis en la Monda Packongreso en Moskvo kaj tie, kune kun la aliaj gravaj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj kaj reprezentantoj de la publika opinio el 143 landoj, povis esprimi el la esperantista vidpunkto siajn opiniojn kaj tiel kontribui al la sukcesplena rezulto de la Kongreso.

Ne estas eble preterlasi la pluan eventon en la vivo de M E M kaj de la cetera esperantistaro - ĝi okazis en la tagoj, kiam la packongreso estis okazanta. Tiam kulminis kelkjara intensa traktado inter M E M kaj TPK, kies reprezentantoj subskribis du gravajn dokumentojn: la KOMUNAN DEKLARON kaj INTERKONSENTON pri la intima, praktika kaj ambaŭflanke utila kunlaboro inter tiuj ĉi institucioj kaj iliaj landaj organoj. La dokumentojn subskribis por TPK ĝia ĝenerala sekretario R.Ĉandra kaj por M E M ties prezidanto N.Aleksiev.

Jen, la plua plezuriga venko de l' tutmonda esperantistaro, kiu digne viziĝas al tiuj, kiujn M E M akiris dum sia 20jara aktivado.

La Internacia Komitato de MEM, klopodante digne profiti la belan jubileon, esprimis sian agnoskon kaj dankon al tiuj, kiuj pleje meritigis pri la rezultoj atingitaj dum la pasinta periodo, aljuĝinte al ili Honor-Insigonojn de M E M kun Diplomo kaj titolo Laureato.

Novaj, pretendoplenaj taskoj atendas M E M kaj ĉiujn celkonsciajn esperantistojn en la venonta agadperiodo. La plejparto de tiuj ĉi jam bone komprenas, kie estas ilia loko kaj kien ili direktu sian aktivecon. Antaŭ ni ĉiuj etendas sin la vojo irenda - al la daŭra paco, amika kunlaboro kaj interkompreniĝo de ĉiuj homoj kaj nacioj en la mondo.

## Saluto el Moskvo

Nikola Aleksiev, la prezidanto de M E M kaj gvidanto de ties delegitaro al la Packongreso en Moskvo, sendis al Josef Vitek, la prezidanto de ĈEA salutkarton, en kiu li skribas:

"Mi troviĝas en Moskvo lige kun la Tutmonda Kongreso de pacamaj fortoj frunte de la delegitaro de M E M. La kongreso bone funkcias. Lige kun la datreveno de la Granda Oktobra Revolucio mi bondeziras al vi ĉion bonan en via privata vivo kaj en via socia speciale porpaca agado".

Via: N.Aleksiev

Survoje el Moskvo al Beogrado haltis en Praha (la 11an kaj 12an de nov.) la prezidanto de la jugoslavia MEM-sekcio, k-do D.Bjelanoviĉ, alportante freŝajn informojn pri la sukceso de la moskva packongreso, kiun li partoprenis kiel ano de la sesmembra delegitaro de MEM. D.Bjelanoviĉ renkontigis kun T.Balda, ĝen.sekr.de MEM kaj kun la aliaj funkciuloj.

## Pri ĈSSR en Riga

La 31an de okt.okazis en la Riga Esperanto-Klubo (Latva SSR) vespero dediĉita al Ĉeĥoslovakio. La atenton de la partoprenantoj logis unue riĉhava ekspozicio kun diversaj ĉs. eldonaĵoj: revuoj, libroj, turismaj prospektoj, gazetetranĉaĵoj, vortaroj, bildkartoj kaj ankaŭ publikaĵoj en la ĉeĥa lingvo.

La kluba prezidanto E.Jaunvalks prelegis pri la ekonomia kaj politika vivo en ĈSSR, s-ino M.Burgmeister parolis pri la poeto P.Bezruč. La ĉeestantoj havis eblecon vidi ankaŭ la ilustraĵojn por la "Sileziaj kantoj" de H.Salichová. S.Neilande konatigis la historion kaj nuntempon de Praha kaj E.Lippe prezentis poemojn de M.Jakubcová. Ŝi parolis ankaŭ pri la tradukoj el la latva de prof. M. Lukáš.

La vesperon partoprenis ankaŭ la junularo. Apartajn programerojn pri Ĉeĥoslovakio prezentis L.Bērzina, T.Bērcis k.a. Grandan ĝojon faris saluleteroj kaj bildkartoj, kiujn grandnombre sendis por tiu ĉi vespero la amikoj el ĈSSR.

(M-a)



# Na prahu nového roku

Končí se rok 1973, který pronáš svaz znamenal období intenzivní konsolidace. Stýkali jsme se s našimi členy na stránkách našeho časopisu, kde jsme se snažili upozornovat na opatření, která je třeba uvést do života.

Většina našich členů již pochopila, že předsednictvo i ostatní výkonné orgány svazu chtějí učinit pro dobro naší společné myšlenky maximum, a že to také v rámci současných možností činí.

Těžště naši práce musíme spatřovat zejména ve vhodné aplikaci esperanta pro potřeby celé společnosti. I ta se bemenší a zdánlivě nevýznamná práce je součástí naší angažovanosti, z které vyplývá uznání pro celé hnutí.

Je třeba se více zapojit do veřejného a politického života a na půdě národních výborů, zájmových a společenských organizací taktně, ale rozhodně uplatňovat naše myšlenky a nabídnout je k prospěchu vlasti.

Je třeba, aby naše místní skupiny ještě více pomáhaly v akcích "Z" - při organizování různých služeb v obcích či v bydlíštích, při zabezpečování veřejně prospěšných prací. Věříme, že v příštím prvomájovém průvodu půjde více našich skupin pod transparenty, aby tak dokumentovaly svoji angažovanost v boji za mír a dorozumění. Svou širokou členskou základnou by měl jít příkladem pražský klub.

Budeme muset daleko více zaktivizovat komise a sekce, aby se staly dělnou součástí celého svazu. Není to jenom sekce mládeže, která živoří (a my přitom víme, že je dost nadšených mladých členů svazu, kteří by se měli ujmout iniciativy), jsou to také komise jazyková a propagační, pedagogická sekce a další. Svaz již nelze brát jako sekretariát, předsednictvo a ústřední výbor. Svaz je několik tisíc lidí a ne několik desítek funkcionářů.

I naše organizátorská práce se musí prohloubit tak, aby jednotlivé místní skupiny a kroužky byly vedeny skutečně odborně a metodicky. Věříme, že již bude více času na osobní návštěvy a - dovolí-li to finanční situace svazu - také na pravidelná setkání s funkcionáři kroužků.

Chceme-li tedy, aby se naše předsta-

vy postupně staly skutkem, je nutné uvědomit si v první řadě, že jak budeme aktivní my, tak bude aktivní svaz a celé naše hnutí. Jsme a ještě dlouho budeme existenčně závislí sami na sobě, a je tedy třeba plnit všechny základní členské povinnosti, všimát si všeho a m o ž n o s t í v naší činnosti, naplňovat je s k u t k y a podle svých schopností se přihlásit k aktivní práci ve svazu.

Jenom tak se dočkáme ještě větších úspěchů v novém roce, do kterého vám společně přejeme hodně zdraví, osobních úspěchů, trpělivosti a vytrvalosti i vzájemného porozumění pro naše společné zájmy.

Josef Vítek  
předseda

Zdeněk Křimský  
tajemník

## JUBILEO DE J.MAŘÍK

La 22an de dec. ĝisvivoŝ sian 60an vivo-jaron Jaroslav M a ř í k. Esp. movadon li ekkontaktis en 1934. Li estis unua tutprofesia E- radioparolanto kaj tradukisto (1946-50), ĝenerala sekretario de EACS (1948-52), UEA-komitatano (1950-51), junularsekciestro de TKKE k ĉefdelegito de E-junularo en ĈSR (1955-57), prez. de EK Praha (1958-61), prezidanto de Preparkomitato de ĈEA k ĝia estrarano (de 1969).

J.Mařík redaktis junularan bultenon "Tagiĝo" (1957) kaj kunlaboris al pluraj gazetoj. En SET li prelegis pri la historio de la E-movado kaj kompilis tiucele "Resuma historio de la E-movado" (1955). El lia traduka laboro ni menciuj: "Fremdlingva korespondado de filatelistoj", Konstitucio de ĈSR (el E-o tradukita en la ĉinan), Lerneja reformo en ĈSR" k.a.

Lastatempe li kinaŭtoris en la poŝvortaro E-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta de R. Hromada kaj lektoris la Poŝatlason de la Mondo en Esperanto. V.Novobilský

Jarmila S ý k o r o v á kaj Vladislav H a s a l a geedziĝis la 10an de novembro en Mutěnice. Gratulon!

Forpasis la 29an de okt. Z. M o u d r ý, Brno (nask.1956). Nian kondolencan!

La tradicia Esp. balo okazos la 2an de februaro 1974 en Česká Třebová.

## VASTA KAMPO por la fakaj asocioj

Tre versajne niaj klopodoj ne realiĝos en baldaŭa estonteco. Al "Esperanto, la dua lingvo por ĉiuj" antaŭiras la periodo de Esperanto kiel unu solvo inter pluraj. Imponas nur niaj efektivaj faroj. Ilia centra pozicio en nia argumentado ja estis substrekita ankau en la salutmesaĝo de prezidento Tito legita dum la ĉijara UK en Beogrado, kaj prezidento Jonas dum la kongreso en Vieno same konsilis al ni, doni al Esperanto unue pli vastan fondon prepare al la sukceso.

La federacia prezidento Dro Heine-mann demandis, kio estus la decida breĉobato por Esperanto nuntempe. Mi respondis (sub la impreso de la prezidenta favoro por la angla), ke Esperanto estu vere agnoskita kiel unu el la eblaj solvoj por la mondlingva problemo. Tia agnosko venas kutime de la scienco, kaj tial esploradoj pri "la kondiĉoj sociologiaj, kulturaj kaj lingvistikaj de komuna norma lingvo uzota en la internaciaj rilatoj" estas urĝe bezonataj.

Sed tio estas nur unu flanko de la medalo, la teorio. Se io serĉas agnoskon, sampeze gravas la praktiko, la apliko de la Internacia Lingvo por iu senca afero.

Jen estas la vasta kampo por la fakaj asocioj en la Esp.movado. Tie ili laboradas, kaj el tio konsekvencas ilia kontribuo por nia celo - aktivi kaj per tio decide kunhelpi en la breĉobato favore por Esperanto. Per fakaj laboroj ili pruvas, ke Esperanto kapablas servi sur ĝenerale rekonitaj kampoj kaj ĝi tiel povas enviciĝi inter la socie akceptitaj instrumentoj.

(El la prelego de d-ro W.Bormann, UEA-estrarano por landaj kaj fakaj asocioj, dum la jarkunveno de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, la 6an de okt. en Bielefeld).

### ĈU VI SCIAS, KE...


la revuo P A C O - organo de M E M - aperados ekde la venonta jaro laŭ la nova eldonsistemo, ĉiam la duan monaton kaj - a k u r a t e ?!

Paginte la abonkotizon 30 Kčs vi

povas samtempe fariĝi ano de M E M.

Pagu la abonon por 1974 per la poŝtmandato de ĈEA ankoraŭ antaŭ la jarfino - vi certigos al vi ĝustatempan liveron de la revuo PACO !

Kia ESTAS kaj kia ESTOS la homa naturo ? Ĉu ĝi ŝanĝiĝos kun la abrupta evoluo de la tekniko ? Entreprenu aventuran ekspedicion en la tempon estontan, kien gvidos vin -



la atentostreĉa novelaro

### LA PERDITA VIZAĜO

de Josef N e s v a d b a, la ĉeĥa verkisto sciencfikcia. La libro, kiu kontentigos eĉ la plej pretendeman leganton, baldaŭ aperos fare de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Eldonkvanto 5000 ekzempleroj. Proksimuma kosto 20 Kčs.

### Rondeta vivo

H R A D E C K R Á L O V Ě - La 13an de novembro la Esperantista Klubo aranĝis vesperon, ĉe kiu profesoro Miloš Lukáš faris diskurson pri la Granda Oktobra Revolucio.

O S T R A V A - Solenan koncerton honore al d-ro L.L.Zamenhof aranĝis la 3an de decembro la lokaj grupoj de ĈEA en Ostrava kaj Paskov.

Kiel gasto sin prezentis la vira kantoro "Smetana" el Frýdek Místek kun ĥor- kaj solkantoj en Esperanto.

# SNADNÝ, PŘESNÝ, ŽIVÝ JAZYK

Problémy interlingvistiky a postojem lingvistů k otázce mezinárodní řeči obíral se v časopise "Cizí jazyky ve škole" ve své rádobyobjektivní úvaze J.Tomin, který provedl srovnání Schleyerova volapüku a Zamenhofova esperanta. Výsledek prozrazuje, že autor je stoupencem tzv.interlinguy. Uveřejňujeme podstatný výtah z polemické odpovědi J.K o ř í n k a redakci časopisu.

Autorovi článku se na esperantu nelíbí zejména existence akuzativu a plurálních koncovek -j, -ojn, -ajn. Uvádí esperantská složená slova, která údajně nemají nic společného s mezinárodními ekvivalenty. Zamlčuje, že i v esperantu existují vedle složených slov ze základního kmenového fondu paralelně tvary mezinárodní, např. vedle malsanulejo i hospitalo a sanatorio, vedle mallonga také kurta atd.

To, co se jedněm snad zdá podivné nebo nezvyklé, jako je plurální koncovka -j, existence akuzativu, konstantní koncovky pro substantiva a adjektiva, to je pro plánovaný jazyk skutečným přínosem, který do jazyka vnáší pevný řád. Koncovka -j není např. nikomu nelibozvučná, ač hojná, v antické řečtině. Pevná koncovka akuzativu -n je znakem vyššího vývojového stadia řeči, dodává jí přesnosti a činí slovosled značně nezávislým. Důsledné uplatnění přípon není absurdní; tvoří-li čeština ženský rod příponou -yně, -ina ve slovech bohyně, Pavlína, němčina příponou -in (Königin), tvoří esperanto příponou -in důsledně všechny ženské tvary: aktorino, fratino atd. Mimo tuto řadu je jen femalo a panjo.

Konstantní koncovky a důsledné uplatnění jednoznačných afixů je též důmyslným přínosem pro mezinárodní řeč. Vždyť koncovky mezinárodních slov se v národních jazycích různí, viz např. slovo řeckého původu metoda (něm. Methode, angl. method, fr.méthode, ital. metodo). Z toho vyplývá, že není nejdůležitější, aby z více-méně mezinárodních tvarů polyglot pasivně rozuměl textu v mezinárodní řeči, ale aby její soustava byla snadná, pravidelná a důsledná, a k dispozici všem, kdož se jí n a u č í, tedy stejně dělníkovi jako třeba profesoru latiny.

Esperanto je jazyk pravidelný, přesný a logický, nezachází však do extrémů. Je libozvučný a živý. Je rozšířený a prakticky dobře použitelný díky svým světovým organizacím. Má svoji tradici a je vývojově svévbný, obohacuje se jako všechny ostatní živé jazyky.

Pozoruhodný je v tomto směru výsledek konference v Institutu ruského jazyka Akademie věd SSSR na téma "Vztah přírodních a umělých jazyků", která se konala ve dnech 24.-27.října 1972 v Moskvě. Za účasti více než 100 vědců podali pro esperanto jednoznačně kladné posudky doc.M.I.Isajev, S.N.Kuzněcov, V.F.Grigorjev, V.A.Vasiljev, prof. D.L.Armand, dr.A.I.Vaitilavičius, E.A.Mozerts, A.M.Lichtgejm a ing. T.Kulagin.

Ze esperanto nedosáhlo dosud žádoucího rozšíření, není zaviněno jeho strukturou. Každý jazyk je jemný nástroj, a ne každý člověk má vlohy a vytrvalost naučit se i poměrně snadnému a pravidelnému jazyku.

## ČES hledá aktivisty

Sekretariát ČES hledá stálé spolupracovníky - zejména členy bydlící poblíž Prahy a vlastníci psací stroj - na různé administrativní práce, částečně i za honorář. Rovněž jsou vítáni zájemci o práci v revizní komisi ÚV ČES, znalí účetní evidence, řízení, práva a. j.

Do stálého pracovního poměru přijme sekretariát svazu členku ČES, která ovládá psaní na stroji a alespoň částečně esperanto a administrativní práce.

Nástupní plat 1200 Kčs, plus odměny podle plnění jmenovitých úkolů. Svaz přijme na toto místo i důchodce - členku nebo členu ČES - pokud by mohl dojíždět do sekretariátu. Nástup možný ihned, nejpozději však 1.4.1974. Bližší informace podá tajemník Z.Křimský.

PRI STARTO EKSTERLANDE. D-ro Bormann W, estrarano de UEA: el vidpunkto de informriĉeco Starto estas pli interesa ol revuoj de aliaj landaj asocioj en la socialisma j ŝtatoj o Pola Esperantisto 2/73 represis artikolon de S-o "Esperanto sur bildekrano (1/73).

Z. Matyková

## Ruĝa globeto

En la gastejo ĉe Matěna en Dolany estis vivoplene. Kunvenis gaja bando kaj kiam ili iom satrinkis, ili komencis kvereli.

"Lasu tion, knaboj!" admonis ilin sinjoro Pácalt. "Ĉu vi ne povas amuzi vin alimaniere?"

"Jes, sed kiamaniere?"

"Do mi konsilos al vi. Eble tiel, kiu plej larĝe malfermos la buŝon."

"Kaj tion mi povus fari, knaboj, tion mi povus provi, ja mi havas la buŝon kiel krokodilo. Jes, mi konsentas, kaj kiu venkos, ricevos duoblan litron da biero," kriis Tylš kaj plenlarĝe malfermis la buŝon. Post li la dua, tria...

"Kiel ĉe idiotoj!" ekkriis Pácalt kaj ĝojis, ke ili tuj facile ekflamis.

"Do, kiu plej larĝe?"

"Mi!"

"Mi!"

"Nu, knaboj, tio tiamaniere ne eblas. La buŝon mi devas mezuri".

"Facile oni diras, Tylš, mezuri, sed kiamaniere, se la buŝoj estas rondformaj?"

"Nu, eble en ĉi tiu kazo ni povus mezuri tion per farunbulo".

"Jes, sed havi ĝin. He, gastejestrino, ĉu vi ne havas tie farunbulon?"

"Ne, ne, mi ne havas ĝin, sed mi havas melonon!"

"Ne ŝercmoku nin, virinaĉo, tion mi opinias tute serioze".

"Do, metu buŝon sur buŝon!"

"Nuuu jes, karulino, tio estas ideo!"

Sed kion ajn kaj kiel ajn ili faris, la buŝojn ili ne finmezuris.

"Kaj, ekzemple ĉu najbaroj", diris la gastejestrino, "ĉu ekzemple bilardan globeton? Eble tiu povus enpenetri buŝon". --

En tiu momento ĉiuj okuloj ekrigardis tablon, kie en angulo premiĝis tri bilardaj globetoj. Du blankaj, unu ruĝa.

"Jen vi vidas, viraĉoj, kiom ni kapablas kompare al virina intelekto!", ekkriis Pácalt okulumante la gastejestrinon kaj manetendante al bilarda globeto. Li elektis tiun ruĝan.

"Kaj nun montru la buŝojn. Hm, al vi ne, al vi ankaŭ ne, viraĉoj, vi havas tro mallarĝajn buŝojn".

"Sed al mi ĝi ne povas enpenetri tien!" proponis Tylš.

"Enpuŝegigu ĝin do al li tien", kriegis ĉiuj.

"Tylš malfermis la buŝon tiel larĝe, kiel li nur povis, kaj li mem enpuŝis la globeton tien, ĝis la okuloj ruliĝis el la kavoj.

"Atentu, Tylš, ke io ne trafu vin!"

"Nu, do viraĉoj, helpu min!"

Pácalt apogis sin per la pugno sur la globeto. "Pli forte, pli forte, ankoraŭ pli forte!", kriis la ceteraj. Sed vana laboro. La haroj sur la kapo de Tylš hirtigis kaj ŝvito malsekigis lian vizagon. "Tiel ankoraŭ foje, unu, du, tri! He ruk!", nu kaj jam tio estis.

Tra la ĉambrego eksonis krio - Tylš venkis, Tylš venkis! Nur Tylš ne kriis, li kriigus se li povus. La langon alpremitan ĝis en gorgo, okulojn kiel rano, li elpuŝis nur gorgsonojn: he, he he ...

Kaj la duobla litro da biero estis jam ĉi tie. "Nu, Tylš, elkraĉu tion kaj englutegu tion ĉi". Sed facile oni diras elkraĉu kaj englutegu, se la globeto estis tie enigita kiel grenado en kanono, Ili tiris, tiris, sed eltiri ne povis --

"Alportu peceton da ligno", ordonis Pácalt.

Ili alportis lignostangeton. Ili subprenis, eklevis la stangeton kaj Tylš subite ekkriegis. Tiam la globeto jam estis ele kaj ruliĝis sur la tero en obskuran angulon.

Ĉiuj suspiris, nur Tylš kun disŝirita lipanguleto spiris kiel ekveturanta lokomotivo. (Tria premio en literatura konkurso de Starto, originala prozo)

# INDEKSO

## 1 9 7 3

S T A R T O - eldonas ĈEA, p.k.8, 120 21, Praha. Aperas okfoje jare. Resp. redaktoro O. Kníchal. Red. komitato : ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. - Dohl. pošta Praha 07, smiž. pošt. poplatek pov. RP Praha j.z. P/1 - 2283 / 1971. (30.11.73)

G L O S O J	n-ro	R O N D E T A	V I V O	n-ro
Nia vojo (T. Balda)	8	Bor (3-4, 5),	Brno (1, 2, 7),	Hodonín (5),
Rememore pri Februaro (F. Sviták)	2	řice (5),	Hr. Králové (1, 2, 8),	Jablonec n.
Předsjezdové zamyšlení (D. Kočvara)	2	N. (2, 5),	K. Vary (3-4),	Kolín (3-4),
Pri kelkaj aktualaj problemoj (Fx)	7	kroun (3-4),	Kopřivnice (1),	Mělník (1, 2)
Nad vašimi dopisy (Z. Křimský)	7	Městec Kr. (3-4),	Olomouc (2),	Ostrava (1,
Na prahu nového roku (Vítek, Křimský)	8	2, 7),	Ostrov n.O. (2, 5),	Pardubice (2),
Instigo por ni (k)	7	Paskov (8),	Písek (7),	Poděbrady (5, 7),
		Přerov (5),	Příbram (3-4, 5),	Semily (5),
		Šumperk (2, 7),	Teplice (2),	Třebíč (2, 7),
		Ústí n.L. (1, 2),	Vsetín (2, 3-4, 5),	Znojmo
				(3-4, 7)
<b>ORGANIZA VIVO</b>				
Ek al... (J. Vítek)	1			
Grava progresiga paŝo (kni)	1			
Kunsido de GK ĈEA	1			
Do nové etapy našeho hnutí (kř+kni)	3-4	<b>P E R S O N E</b>		
10. zasedání UV ĈES (kni)	3-4	Forpaso de L. Krajíc (k)		2
Jak dál s placením (Z. Křimský)	5	Monumento al la pioniroj (Slaný)		3-4
Proč zřizujeme místní skupiny (kř)	6	Honorigo al V. Echtner (k)		3-4
Vážíme si spolupráce s ĈES (kni)	3-4	La vivo plena de lumo (k)		5
Sukcesinta renkontiĝo (JK)	3-4	T. Balda 65jara (k)		7
Omáĝe al Kopernik kaj Zamenhof		Medalo al A. Bartošík		7
(M. Lukáš)	3-4	Jubileo de J. Mařík (V. Novobilský)		8
Bela semajno en B. Bystrica (kř)	6			
Niaj reprezentantoj en Sopot kaj		<b>E S P E R A N T O L O G I O</b>		
Budapeŝto (k)	3-4	Caveant consules (V. Pechoč, fx)		3-4
Pri ĈSSR en Riga (M-a)	8	Inundo de neologismoj ? (eto)		5
Esperanto ne povas venki sen		Por la Zamenhofa Esperanto (K. Pič)		6
paco (J. Tomčík)	6	Neologismofobio kaj neologismomano		7
Planu vian libertempon	2	(J. Kořínek)		7
Laborkonferenco de ĈEA en Ostrava		Lingva konsilanto (V. Echtner)		7
(dokumentoj)	3-4	Sciencistoj pri I.L. (jm)		6
		Snadný, přesný, živý jazyk (Kořínek)		8
<b>F A K O J</b>				
Konferenco mírové sekce	3-4	<b>B E L E T R O, R A P O R T A Ĵ O J</b>		
Jarkunveno de Fed. sekcio (kr)	3-4	Ni en Moskvo (R. Horský)		1, 2
Esperanto sur bildekranu (kni)	1	Malfacilaĵoj de klerulo (M. Švan-		3-4
Lando, kie oni povas lerni (Leonardo)	7	drlík, trad. M. Lukáš)		5
Jarkunveno de fervojistoj	1	Jakobo ne ŝatas fabelojn (Kraft)		6
Fervojistoj en Plzen	7	Babelturo (I. Hurník, trad. Bednařík)		7
El teknikista sekcio	1	Sortodecida veturo (J. Adamec)		8
Teknikistoj raportas	3-4	Ruĝa globeto (Z. Matyková)		5
Muzikista sekcio fondota	5	Ĉe amikoj en Gus Ĥrustalnia (Rusín)		2
Kion povas fari la fakaj asocioj	8	Invito al Ostrava (A. Staňura)		
(W. Bormann)				
<b>J U N U L A R O, S. E. T.</b>				
Esp. junuloj en Rynoltice (k)	2	<b>N O V A J L I B R O J</b>		
Rynoltice popáté	3-4	B. Lavreněv : La kvardekunua (1), E. Krus-		
6 x en Černá Louže	7	ten: Okupacio (2), U. Lins : La danĝera		
Junaj esp. en Berlino (V. Vítek)	6	lingvo (5), La bambufluto (6), Paco -		
Ĝa jardeko en Lančov (str-juř)	6	- afero de Ĉiuj (7), Ridu per Esper-		
Sukcesa S. J. E. T. en Latvio (Andr.)	7	anto (7), M. Ĝivoje: Esperantonimoj (8)		

# Korespondi deziras

RUMANIO - Andrian PIRLOGEANU, 19j., str. Porumbescu 4-A-6, Cimpulung-Bucovina o f-ino VACARU Florica 18j. cm. Bogdanesti, jud. Suceava o VRABIE Liliana 18j. str. Maraesti 7-B-16, Suceava 6 o BERCEA Mihaela 31j. Banești-Fintinele, jud. Suceava o PERPEGEL Rodica 18j., Timiș 11, Tîrgul-Jiu o CHIRICA Maria, Ciotina 11, Jacobeni jud. Suceava o POPESCU Florica 23j str. I. Creanga 8, Falticeni o UNGUREANU Claudia 18j., Grivita Rosie 7, Radauti-Bucovina o VESEA Ionel 18j. str. Barbusse 18/26-A-19, Arad o f-ino SURUCEANU Teodora 45j. oficistino, 23 August 259 ap. 23, Ploiești o IONASCU Titu 19j. Liceul Pedagogic, Olutului 106, Tg. Jiu o f-ino DRUGAN Elena 18j. str. Timiș 17, Tg. Jiu o OLARIU Costel 17j., Mitocelului 42, Suceava 3 o BLEANCA Costel 17j. str. Aurel Vlaicu 36, Suceava 5 o f-ino TOMNIUC Ana 20j. kontistino, Mihaileni-Sinaiti, jud. Botoșani o ing. PATRAS Sorin 32j. str. Arini 10-A, ap. 8 Suceava 6.

HUNGARIO - Marieta GREMOLA 13j. 9025 Győr, Kóztelek u. 3/6 o f-ino Judit LAURINYECZ 17j., 5600 Békéscsaba Munkácsy u. 12 o Sándor SZOTER, Hungara Gyubavan, Kossuth Lajos u. 6 o Katalin HORVÁTH 14j. H-9024, Győr, Kalvária u. 7/B, Ite.

POLLANDO - R. STEMPIEN 20j. 59-840 - Zavidów, str. G. Skłodowskiej 9

UKRAINA SSR - 15 knaboj 16j. kun la ĉefaj amikoj k Rumanio : A. VOJNAROVIC, Esperanto PTU-43, 343871, Avdeevka Doneckoj obl.

Ĉ E S R - Rudolf KOSTKA, 27309 Šermov II. sídl., ul. M. Majerové 548, okr. Kladno.

## Filmy k dispozici

Zájemci o filmy v esperantu, zapůjčte si z filmotéky EK Písek :

Renkontiĝo kun FIAT (rok v. 1965, délka 253 m), Projekto n-ro 128 (1966/321), FIAT 130 (1966/170), Operacio Sekureco (1967/216), Malpli ol mil -

(1969/192), 125 Testo (1970/240), Cascadeur (1971/152), Všechny filmy jsou barevné, šířka 16 mm. Filmy skladuje a zapůjčuje L. Krivánek, Zborovská 1332, 397 01, Písek ; za zapůjčení jedné zásilky (bez ohledu na počet kusů) se požaduje 20 Kčs - na úhradu režijních nákladů. Redakce očekává další podobné informace od EK.

## ni legis :

M. Givoje : ESPERANTONIMOJ. Milano 1973, 1-a eld., 111 paĝoj.

Laŭ lingvistoj IL ne estas sufiĉe ekzakta, ĉar ĝi havas sinonimojn, homonimojn, laŭ literaturistoj tro ekzakta, pro manko de polisemio... La vero estas meze : ĝi estas maksimume ekzakta.

Jen la unua pruvo : modesta verketo, tre bonintenca kaj vere aktuala. Ĝian veran valoron mi vidas en tiu ĝia esperebla efiko, per kiu ĝi sukcesos direkti la atenton de niaj esperantologoj al la multe pli serioza studado de la semantikaj problemoj.

(d-ro I. Szerdahelyi en la enkonduko)

PEDAGOGIA SEKCIO DE ĈEA intencas surbendigi programon, kiu enhavos viajn kontribuojn alterne kun muziko kaj E-kantoj. Kion ni atendas de vi ? Bonvolu maks. en 30 linioj priskribi interesan travivaĵon el via Esp. vivo, kiu dokumentas kulturalan valoron de E-o, ĝian signifon por la paco kaj internacia amikeco. Viajn leterojn ni atendas ĝis la fino de februaro 1974. Sendu ilin al : D-ro V. Novobilský, ČSc, Školní 5, 400 01 Ústí n. L. Antaŭdankon!

## TELEGRAFE...

Post 40 jaroj aperis nova lernolibro de E-o en Estona SSR. La eldonkvanto - 35 000 ekzempleroj. • Ekde 1974 aperados fare de Fremdlingva eldonejo en Hanojo antologio de la vjetnama literaturo en E-o. • Partoprenantoj de la 17a Esperantista Skirestado en Adelboden (Svislando) inter la 26. 12. 73 kaj 5. 1. 74 povos eklerni aŭ perfektigi la skiarton en internacilingva medio.

## Rano kaj alaŭdo

Rano diris	Ĝi respondis :
al alaŭdo :	mia loĝo !
ci nur kantas	Ci plaudigu
por aplaŭdo !	en la koto !

(Š. Urban : "Nova Ezopo")